

Manfred Hausmann,
Verschneiter Fluss

Argiope-informo:
La aspekto de tiu ĉi versio estas barita.
Supozeble la aŭtoro decidis tion.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas MANFRED HAUSMANN (*1898-09-10 – †1986-08-06).*

Arg-913-1826 (2013-08-06 23:13:43)

La poemo aperis en la libro “Hinter dem Perlenvorhang”, Gedichte nach dem Chinesischen von Manfred Hausmann, Verlag S. Fischer, 1954. Pri la poeto vidu ankaŭ la retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Manfred_Hausmann. Manfred Hausmann verkis tiun ĉi poemon laŭ poemo verkita de la ĉina poeto Liu Dsung-Yooŭan, laŭ la oficiala latina transskribo: Liǔ Zōngyuán. Pri tiu vidu la retejon http://en.wikipedia.org/wiki/Liu_Zongyuan. Tie estas indikita ankaŭ tiu ĉi poemo.

Manfred Hausmann,
Neĝkovrita rivero

tradukita de Manfred Retzlaff

Senbirda estas tuta la natur',
sub neĝ' la voj' kaj ĉiu homa spur'.

Maljuna vir' vestita per mantel'
jen sidas en boat' kun junk-ĉapel'.

Sen mov' fiŝkaptas en soleco li.
Malhelas akvo. Neĝas, neĝas ĝi.

*Traduko de la Germana poemo “Verschneiter Fluss” de MANFRED HAUSMANN (*1898-09-10 – †1986-08-06) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 2013-07-27.*

Arg-913-1827 (2013-07-28 13:31:57)

Vidu ankaŭ: http://www.cipherjournal.com/html/liu_zongyuan.html.